ROK XXVI.
LUTY
N-r 2.

JARO XXVI.
FEBRUARO
N-o 2.

ELFOSAJO EL STARUNIA.



Rhinoceros antiquitatis el diluvia formacio elfosita el vaksa tavolo en Starunia (troviĝas nun en Muz. de Scienca Akademio en Kraków).

ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO

WYDAWCY: ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID TADEUSZ HODAKOWSKI REDAKTANTOJ

REDAKTOR ODPOWIEDZIALNY: JULJUSZ KRISS.

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—

Konto Pocztowej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:		ANONCOJ:	
1 strona	Zł. 60·—	1 paĝo	Zł. 60·—
1/2 strony	„ 32·—	1/2 paĝo	„ 32·—
1/4 strony	„ 17·—	1/4 paĝo	„ 17·—
1/8 strony	„ 10·—	1/8 paĝo	„ 10·—

PRZEDSTAWICIELE — REPREZENTANTOJ.

Katowice: Soc. de Esper. Amikoj, Wawelska 3.

Paryż: S. Grenkamp, Paris 6. 4 rue de Vaŭgirard.

Warszawa: Pola Stud. Esperantista Societo, Leszno 99. m. 5.

Przyjmują zamówienia abonament. i ogłoszenia do „Polskiego Esper." i „Pomocniczego Języka Świat."

Akceptas abonojn kaj anoncojn por „Pola Esperantisto" kaj „Pomocniczy Język Światowy".

WAŻNE DLA CHCĄCYCH KORESPONDOWAĆ Z ZAGRANICĄ!

Atentu! Ni malfermas en nia revuo la fakon: „Korespondado".

Anonceto de 10 vortoj (krom adreso) kostas Zł. 1.—.

Enpagu tuj je nia PKO. Konto 406.660.

Pensiulo eksfervojisto staciestro serĉas kieajn kia ajn okupon, scias oficajn laborojn. Akceptos ankaŭ lokon kiel oficeja servisto, pordisto, gardisto. Proponojn sendu al **A. Surnikowski, Kazimierz apud Strzemieszyce.**

DO P. T. CZYTELNIKÓW!

Upraszamy uprzejmie P. T. Czytelników o załączenie znaczka pocztowego na odpowiedź, przy wszelkiej korespondencji, zarówno redakcyjnej jak i administracyjnej.

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

ROK XXVI JARO	KRAKÓW LUTY 1932 FEBRUARO	Nr 2 N-o

PROPAGANDA SUGESTO.

Batalante por nia afero kaj propagandante ĝin, ni ĉiam devas sekvi la devizon: senĉese serĉi novajn vojojn en la agado, novajn rimedojn kaj novajn ideojn por tiamaniere enportadi ĉiam en la movadon ne nur interne, sed ankaŭ ĉirkaŭ ni ian freŝecon, kaj eviti la ŝablonecon kaj siaspecan laciĝon kaj enuon, kiujn kutime kaŭzas la ripetado de malnovaj aferoj.

Konfesu, ke en la ĉiutaga propagandado de Esperanto ni aplikas de ĉiam nur unu laŭ ni plej gravan manieron: kursoj, kursoj kaj kursoj. Tiuj lastaj estas la alfo kaj omego de nia propaganda laboro (kun tre malgrandaj esceptoj), kaj fundamento de nia movado, ĉar finfine homo, kiu ne lernas Esperanton, ne povas esti nomata esperantisto. Sed mankas al ni la kuraĝo por pli grandskalaj propagandaj entreprenoj, kaj el la malvasta kadro de kursoj ni timas eliri. Tio faras la impreson, kvazaŭ ni mem subkonscie timus ian riskon, ke ni faros ridindajn paŝojn, ke ni fiaskos. Nu, estas vero, ke multaj ankoraŭ rigardas nin kiel mokindajn utopiistojn, sed se ni pioniras por iu afero, ni devas esti ankaŭ sufiĉe obstinaj kaj malmolnukaj por toleri kaj elteni tiujn mokojn kaj ridojn. Mi pensas, ke plej bona reago, plej trafa argumento kontraŭ la ridinda sinteno de tiuj, kiuj mokas aŭ estas indiferentaj al ni, estas la manifestigo de nia potenco: montri al la socio la grandecon kaj influon de nia afero.

Ni havas jam kelkajn ŝablonajn rimedojn tiurilatajn: propagandaj artikoloj, radio, E-gazetoj kaj E-literaturo, kaj super ĉio — la Universalaj Kongresoj de Esperanto, kiuj ĝis nun estis nekontesteble efikaj demonstracioj por Esperanto. Sed ĉiuj-ĉi rimedoj estas aplikeblaj nur kaj sole de aktivaj esperantistoj mem, kiuj tamen en ĉiu loko aparte estas tre malmultnombraj, sekve malofte aŭ tute ne povas atingi la deziratajn rezultatojn.

Ekzistas grandega nombro da homoj, kiuj mem ne parolante Esperanton tamen favoras ĝin. Oni ne ignoru la psikologian punkton en la disvastigado de Esperanto. Multaj esperantistoj ofte ŝatas kompari Esperanton kun radio aŭ alia utilega inventaĵo, kaj ne povas kompreni, kial Esperanto ne progresas tiel rapide, kiel radio a. s.? Ne forgesu do, ke la diferenco inter radio aŭ alia inventaĵo kaj Esperanto estas tre granda: radio-aparaton vi povas aĉeti, kaj Esperanton vi devas lerni. Nu, la forton, kiun povas havigi al ni tiuj dekmiloj el la „senesperantaj" esperan-

tistoj, ni ĝis nun tute ne ekspluatis. Malatentante ĉi-tion, ni faras grandan eraron.

Se ni enkalkulos la grandegajn nombrojn da homoj, kiuj „principe" subtenas Esperanton, ni konstatas, ke niaj malamikoj aŭ kontraŭuloj preskaŭ ne ekzistas, resp. estas tre malmultaj. Ne gravas, kial tiuj simpatiantoj mem ne lernas nian lingvon: ekzistas mil kaj unu pretekstoj por ne lerni ĝin. Tiun-ĉi sperton certe jam akiris ĉiu propagandisto de Esperanto. Nun estas do necese utiligi tiun-ĉi forton kaj tiurilate mi proponas la jenon:

Sub devizo „Esperanto en lernejon" ĉiu landorganizo E-a proklamas grandskalan enketon inter la enloĝantoj de la koncerna lando: dum la daŭro de tuta jaro ĉiu esperantisto sur speciale preparitaj folioj kolektadu subskribojn de homoj, kiuj simpatias al Esperanto kaj konsentas aŭ deziras, ke Esperanto estu enkondukita en la lernejojn, kiel deviga objekto. Tiuj folioj estu, kompreneble, haveblaj en ĉiu E-grupo aŭ rondo, kaj en tiu-ĉi laboro ĉiu esperantisto havas la moralan devon partopreni.

Ne estas utopio kredi, ke en la daŭro de unu jaro ni sukcesus (ekz. en Polujo) akiri minimume 5.000.000 da subskriboj (kompreneble, se ni energie laboros!). Oni povus ankaŭ apliki eble la t. n. „ĉensistemon". Posedante tiel imponan nombron da subskriboj, ni kuraĝe povos turni nin al la registaro, kiu siaflanke havos la devon atenti la deziron de 5.000.000 civitanoj.

Mi ne asertas insiste, ke tia enketo de 5.000.000 da civitanoj influos la registaron tiel, ke ĝi tuj enkondukos devige Esperanton en la lernejojn. Sed certa estas tio, ke la registaro ne povas ignori, sed nepre devos serioze konsideri tian enketon.

La efektivigo de tiu enketo estas 100%-e ebla afero. Sed mi scias, ke troviĝos samideanoj, kiuj kun kelka dozo da skeptikeco rilatos al tiu-ĉi propono. Jes, ni havas en nia movado homojn, kiuj terure timas eĉ la plej etan malsukceson, aŭ nur ĝian ŝajnon. Ĉu efektive nia movado estas tiel malforta, ke ia-ajn venteto kapablas forporti ĝin kaj neniigi? Se estas tiel, ili ne fanfaronu pri la granda popolo esperantista, en kies lando la suno neniam subiras k. t. p. Se ili mem ne kredas je la potenco de nia afero, estas ridinde ĉiam en niaj kunvenoj kriadi: ni batalu ĝis fina venko. Kiu batalas, ne povas kalkuli sole je venkoj. Grava estas tio, ke ni mem fidu niajn fortojn, kaj feliĉe la granda plimulto havas tiun fidon.

Mi dezirus, ke la supre skizita propono estu metita en la tagordon de nia tutpola plej proksima kongreso aŭ konferenco, se ĝi baldaŭ okazos. Kaj mi ankaŭ petas aliajn esp. gazetojn represi tiun proponon, kiu eble interesos multajn propagandistojn de nia afero.

Kaj kion niaj kompetentaj samideanoj opinias pri ĝi?

I. Lejzerowicz.

EL EKSTERLANDA GAZETARO.

Grava Brazila Jurnalo Jornal do Commercio, unu el plej grandaj Brazilaj gazetoj detale priskribas en la 13 n-ro de novembro la Krakovan Internacian Esper. Kongreson. Oni povas legi en la raporto ne nur tion, kio estas publikigita, sed tre amikan senton por nia agado, kiun spiras la tuta artikolo. Estas videble, ke ĝin skribis ne nur amiko de nia

sankta afero, sed ankaŭ amiko de nia pacema agado kaj la nobla animo komprenanta tutan valoron de la lingvo por pacigaj interpopolaj rilatoj. Ĉu mi devas aldoni, ke estas konstatinde, ke li komprenas la reciprokan senton de nia tuta nacio por Brazila lando kaj popolo?

La artikolo priparolas tre detale la solenan malferman kunsidon en la Katolika Domo, la grandan kunvenon por festi la malkovron de Zamenhofa Memortabulo sur la strato nomita je lia nomo en Kraków, la oratoran konkurson, dum s-ro pastro Font Giralt el Hispanujo ricevis unuan premion, citas nomojn de niaj ŝatataj s-roj Pastro Cseh, forte aplaŭdita dum siaj belegaj kursoj, Morariu, k. al.

Literatura festo de Literatura Mondo, belege aranĝita okupas honoran lokon en la priskribo.

La Aŭtoro konstatas bonegan impreson de ĉiuj Gekongresanoj, kiuj estis speciale kontentaj, ke ĉie oni povis interkompreniĝi en Esperanto, ĉar pola lingvo estas por ili tro malfacila.

Sekvas priskribo de veturado al Warszawa, Białystok kaj diversaj ekskursoj.

La Jurnalo Brazila A Noite publikigas la intervjuon kun f-ino Miss Polonia Zofia Batycka, kiu vizitis Rio Janeiro kaj akcentis, ke ŝi alvenas tien el la lulilo de Esperanto, kaj salutas ĉiujn gesamideanojn.

S-ro T. J. Gueritte fama inĝeniero publikigis anglalingve:

Esperanto in the Field of Engineering. Prelego en la Society of Engineers, 17 Victoria Street Westminster S. W. I. la 2 de Novem. 31.

S-ro G. en sia prelego akcentas neceson de unu interscienca lingvo inter tiom da diversaj uzataj. Dum la internaciaj kongresoj estas necese traduki 5 aŭ pli da fojoj unu raporton. Afero multekosta kaj enuiga. Same estas kun sciencaj libroj en divesaj lingvoj. La Aŭtoro priparolas la eblon kaj maleblon de la uzado de latina kaj aliaj lingvoj naciaj kaj konkludas, ke tio ne estas ebla. Ekzistas nur unu rimedo: facila arta lingvo Esperanto, kiu estas jam delonge uzata vivanta lingvo. Oni jam uzas ĝin en pli ol 100 landoj pere de 1332 diversaj societoj kaj asocioj. En Granda Britujo jam ekzistas 101 grupoj asociitaj kun la Brita Asocio. Jam ekzistas granda literaturo de pli ol 5000 libroj. Eldonataj estas pli ol 100 gazetoj. Dum 1930 estis entute 1909 esperantaj radioparoladoj el 60 stacioj. Estas jam granda pedagogia movado en U. S. A. kaj en aliaj landoj. Diversaj gravaj sciencaj publikaĵoj aperis en esperanto. Internacia Scienca Revuo kaj Medicina Revuo jam delonge publikigas gravajn specialajn raportojn kaj artikolojn. Meteorologio en Japanujo uzas flanke de japana nur Esperanton. Ekzistas Ligo de Poŝtistoj kaj Ligo de Policistoj. Industrio dum internaciaj foiroj estas forte reprezentata. Diversaj vortoj havas en diversaj lingvoj po kelkaj signifoj, el kio sekvas multaj miskomprenoj. En unu traduko el franca lingvo Prof. Billiot trovis ne malpli ol 3000 vortojn de alia signifo ol tion deziris la aŭtoro, tradukante anglen.

La aŭtoro post kelkaj komparaj ekzemploj, konstatas ke Esperanto solvas plej bone malfacilaĵojn de naciaj lingvoj, ĉar ĝi donas plej precizan signifon por diversaj esprimoj.

Estas jam multaj komercaj sciencaj kaj industriaj rondoj, kiuj uzadas Esperanton: Brita Asocio por progreso de la Scienco, Franca Akademio Scienca. Dum la kunsido de 112 francaj Komercaj ĉambroj estas decidite la 2/VI 31 akcepti Esperanton kiel plej logikan facilan lingvon kaj

enkonduki ĝin en lernejojn profesiajn kaj komercajn. Prezidanto de la Pariza Komerca Ĉambro kontaktiĝu kun aliaj Komercaj Ĉambroj de la Mondo rekomendante la disvastigadon de la uzo de la lingvo por komercaj kaj turismaj rilatoj.

Leipziga, Lyona, Pariza, Frankfurta kaj multaj aliaj foiroj jam delonge uzas Esperanton. La vizitantoj de diversaj foiroj, kiuj unuan fojon aŭdis pri Esperanto deklaris, ke ĝi estas plej taŭga rimedo por interrilatoj de diverslingvanoj.

Sekvas malgranda klarigo pri la lingvo kaj ĝia konstruo tre rekomendinda por tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas principojn de la lingvo.

Dum la diskutado la Prezidanto de la kunveno dankas s-ron Gueritte por tiom perfektaj klarigoj kaj estas konvinkita, ke la lingvo devas disvastiĝi inter la publiko. S-ro A. Honneysett A. M. I. C. E. donas ekzemplojn, kiemaniere diversaj esprimoj tute ne klaraj en aliaj lingvoj, iĝas tute klare kompreneblaj en Esperanto. Li citas la vorton kanti kaj prezentas el ĝi devenantajn: kanto, kantisto, kantanto, kantinto, kantonto, kantema, kantemulino, kiuj por ĉiu esperantisto estas tuj kompreneblaj, esprimitaj en unu vorto, kiam en aliaj lingvoj oni devas uzi kelkajn vortojn por ĉiu esprimo. La diskutanto citas kelkajn tre trafajn ekzemplojn de miskomprenoj farataj de inteligentuloj tradukantoj el fremda lingvo. Nur en esperanto oni povas trovi taŭgan tradukilon.

Tre profunde parolis ankaŭ s-ro L. A. Legros pri pli specialaj matematikaj kaj teknikaj esprimoj. Ni ne povas detale citi la diskutadon.

Kun granda miro same kiel s-ro Gueritte ni ekscias, ke tiom perfekta esperantisto kiel s-ro Honneysett ne apartenas ankoraŭ al la Scienca Asocio Esperantista. Grandega bedaŭro, ke tiom meritaj Viroj restas izoluloj! estas ja granda kaj grava perdo por la tuta scienca mondo! ni insiste petas s-ron H. ke li kiel eble plej rapide komencu kunlaboradi kune kun ni!

Responde al s-ro Legros pri la supersignoj kaj aliaj detaloj s-ro Gueritte konsentas, ke estas kelkaj eble ne tre por ĉiuj nacianoj plaĉaj aĵoj en la lingvo mem. Sed oni devas eviti iun ajn ŝanĝon por eviti ĥaoson. Esperanto pli taŭge ol iu ajn eŭropa lingvo aplikiĝas jam nun en Azio, kies popoloj uzas ĝin volonte. Nia lingvo havas tiom multajn internaciajn radikojn, ke estas tre facile komprenebla kaj asimilebla, speciale por tiuj, kiuj jam konas la latinan. Fakaj esprimoj estas ja internaciaj plejmulte. Oni ne povas apliki iun ajn novan eltrovaĵon, ekzemple jam ofte menciatan Anglic, ĉar ĝi estas nur imito de la angla nacia lingvo.

Post la diskutado, je kiu partoprenis s-ro Powell, s-ro Flügel, f-ino E. A. Mann, s-ro Ogdon, oni devas aldoni ke la diskutado okazis skribe, s-ro Gueritte respondas speciale al s-ro Ogdon, kies diversaj riproĉoj kontraŭ esperanto estas ne teknikaj, sed filologiaj kaj lingvistaj. La aŭtoro ja intencis pruvi, ke je inĝeniera vidpunkto estas la lingvo tute aplikebla kaj jam aplikata. La basic Englisch, pri kiu mencias s-ro Ogdon staras en la sama vico de lingvoj ĉiujare iĝantaj, kiuj pruvas nur unu: ke estas necesa helpa lingvo. Ĝi estas same malfacila kaj por internacio ne taŭga kiel diversaj aliaj naciaj lingvoj.

Esperanto enhavas pli ol 1863 fundamentaj radikoj, kiuj kune kun gramatikaj finaĵoj donas pli ol 20000 vortoj tute facile kombineblaj, kiel pruvas tion ekzemplo de s-ro Honeysett jam supre citita. Ĉiu eŭropano, antaŭ ol li komencis lerni esperanton, jam havas en sia lingvo almenaŭ

70 da uzataj en esperanto radikoj. Ĉiuj reformuloj de esperanto jam malaperis aŭ iom post iom malaperas ne posedante eĉ unu libron en sia literaturo, kiam esperanto posedas pli ol 5000 originalaĵoj aŭ tradukoj. Bonvolu nur rigardi grandajn esperanto-bibliotekojn en Wien, Pariza Komerca Ĉambro aŭ en British Esp. As... En Britujo oni publikis en 1931 kune kun tradukoj 9.576 librojn. Tio estas duoble nur pli ol 5000 de la esperanto literaturo.

Mi ĉi tie detale priparolis la broŝuron de s-ro Gueritte, ĉar ĝi estas unu el plej eminentaj okazintaĵoj lastatempaj, tiom pruvantaj la rolon de esperanto en la nuna movado pri helpaj lingvoj.

Estus dezirinde, ke aliaj Esperanto-gazetoj konatigu sian legantaron kun ĝia enhavo. **O. Bujwid.**

LA POLITIKO EN LA OPINIO DE LA ESPERANTISTARO.

Sub tiu titolo nia altŝatata s-ro Redaktoro de Heroldo en la 5 n-ro donas kelkajn klarigojn. Sed liaj klarigoj ŝajnas baziĝi sur ne tute klaraj fontoj, ĉar:

1. Jam Ptolomeo en la 2 jaro. p. Chr. konstatas, ke la slavoj aŭ venetoj loĝas ĉe la baseno de Vistulo. Paŭlo Orosius, hispana historiisto (Script. rer. pruss. 1861 paĝ. 732) citas la rakonton de Wulfstan, anglasaksa navigisto en la 9a jarcento: Vojaĝante dum sep tagoj kaj sep noktoj laŭlonge de sudaj bordoj de la Balta maro, li ĉiam renkontis ĉe la buŝo de la Vistulo Venetan (slavan) loĝantaron.

2. En la X jarcento Poloj organiziĝis je unu sendependa ŝtato sub la pola fondinto de la dinastio de Piastoj, Mieszko, sur la bordoj de Balta maro.

3 La nomo de Danzig estas origine pola. Tion rekonas du germanaj historiistoj: G. Lengnich en la XVIII kaj antaŭ nelonge Simson en sia Geschichte der Stadt Danzig. Li skribas: estas tute certe, ke Danzig estas slava kaj ne germana nomo. Pola nomo Gdańsk devenas el la: ku dana tio signifas al Danujo. Pomerania estas ankaŭ slava: ĝi signifas ĉe mara lando: pollingve Pomorze.

4. En la 1090 j. pola reĝo Boleslao la Brava ekceptas lukse la imperiestron Ottonon III en sia urbo Gniezno kaj kreas samtempe novan polan episkopejon por Pomeranio en Kolberg (Kołobrzeg — kio signifas ĉe la bordo). En la XII jarc. le reĝo Boleslao la III definitive submetas Pomeranion al la pola krono. Prefekto nomita de li estras en lia nomo. De post tiu tempo tuta Pomeranio ĝis la komenco de XIX jarc. apartenas al pola diocezo, kies episkopa sidejo troviĝas en Włocławek. Estis eraro de Boleslao ke post lia morto Polujo estis dividita en 5 partoj inter 5 filoj. En Danzig fondiĝis loka dinastio, sed lingve pola. Sub la administrado de polaj princoj enmigris en la landon multaj germanaj koloniistoj, sed laŭ la konstato de germana historiisto Perlbach (Preusisch polnische Studien zur Geschichte des Mittelalters), tiu ĉi alfluo de germanaj koloniistoj tute ne ŝanĝis la funde polan karakteron de la lando.

5. Polujo, katolika depost 966 klopodis kristanigi la idolanojn de Prusujo. Tiu hatalema litova gento ne ĉesis ofte rabadi polajn limajn

landojn. Sed Roma papo preferis kristanigi ilin pere de la Teŭtona Ordeno de Kruckavaliroj. Konrado de Mazovio proponis al la Ordeno kristanigi Prusujon kaj samtempe protekti liajn landojn. Ne rezignante je sia suverena rajto, li donacis al la Ordeno la landon de Chełmno (Kulm). Sed al papo estis prezentitaj falsaj dokumentoj kaj li donacis la landon „poreterne" al la Ordeno.

6. Ordeno komencis la sisteman konkeron de Prusujo. La 14 de novembro ĝi ruze ekokupis Danzig kaj invadis polan Pomeranion. La loĝantaro de Danzig kaj Tczew estis elbuĉita. Danziga historiisto Leschin kalkulas 10.000 da viktimoj. Pola reĝo Jagiełło ne eluzis sian venkon super la Ordeno en 1410 sub Tanenberg kaj ne volis neniigi Ordenon, sed 1454 lia filo Kazimiro Jagelonido enkorpigis Pomeranion al Polujo. Sed duan fojon Polujo preterlasis la okazon likvidi la germanan okupadon ĉe la Balta maro kaj ripari la eraron de Konrado Mazovia. Ĝi lasis al teŭtonoj la tutan Prusujon kaj kontentiĝis pri la rajto de suvereneco.

7. En 1528 Grandmajstro Alberto transiras kun la ordeno al luteranismo, sed Sigismondo pola reĝo sankciis tiun ŝanĝon kaj rekonis lin vasalo. Alberto akceptis la titolon de duko en Prusujo kaj solene fideljuris sur la krakova placo la vasalecon al la pola reĝo. Tiu ĉi situacio daŭris ĝis la 1640. Frederiko Wilhelmo rekonas sin vasalo de Svedujo.

8. 1772 post la unua dispartigo de Polujo Prusujo proprigis al si la nunan koridoron krom Danzig kaj Toruń. Danzig dum tuta tempo restis fidela al Polujo. Li ofte ribelis kontraŭ la perfortoj de la Ordeno. Du urbestroj: Konrado Letzkow kaj Arnoldo Hecht kaj la skabeno Gross pagis per sia vivo la fidelecon. Ili estis perfide murditaj laŭ la ordono de Ordena komturo V. Plauen. Frederiko Wilhelmo en 1793 okupis Danzig. Multaj loĝantoj inter ili Johanna Schopenhauer, patrino de la konata filozofo, forlasis la urbon, ne volante resti sub la prusa regado.

Kiel ni vidas tio, kion germanoj nomas danciga koridoro, laŭ la gernanaj fontoj kaj atlasoj ĉiam ekzistis. Dufoje ĝi estis subigita al eksterlanda aŭtoritato. Dum 146 jaroj ĝi estis dominita de la Teŭtona ordeno, dum 148 (1772—1920) ĝi estis okupita de la Prusa Reĝolando. La urbo Danzig escepte preskaŭ ĉiam apartenis al Polujo. Dum 146 jaroj ĝi ribelis kontraŭ Teŭtona Ordeno, poste libere aliĝis al Polujo (1454) kaj restis fidela ĝis la fino. Dum ok jaroj ĝi estis libera urbo 1807—1815.

(El la Pol-Pomeranio de K. Smogorzewski, traduko de Grenkamp-Kornfeld). **O. Bujwid.**

TADEUSZ BILIŃSKI.

PARIZO, LA URBO-DE LUMO KAJ ĜOJO.

Parizo! Ĉu estas ia pli magia vorto ol ĝi — vorto, kiu tiom esprimus kaj ĉiam havus tian sugestian kaj altiran forton!? — Parizo — „ville lumière" — urbo de la lumo, la ĉefurbo de l' mondo, tiu Meko de la kulturo, modo kaj ĝojo, kiu allogas ĉiam pilgrimantojn el la tuta terglobo, kiuj tie serĉas, ĉiu ion alian, kaj preskaŭ ĉiuj la „ĝojon de la vivo", plezuron, aŭ amuzon.

Parizo — jen estas vera **kosmopolis, internacia urbo**, gastanta la tutan jaron ĉiujn rasojn kaj lingvojn, ekzotajn princojn, negrajn reĝetojn, hindajn raĝojn, reĝojn kun krono kaj sen ĝi, same kiel sovetajn emi-

sariojn, vagemulojn, internaciajn „hoĥstaplerojn", kaj ĝentelmenojn — enropiĝulojn...

Sed Parizo estas ankaŭ la urbo de l' revoj kaj sopiroj de ĉiuj artistoj, pentristoj, poetoj kaj muzikistoj, kiuj ĉi tien alveninte, por „studadi", revas pri la gloro kaj... mono — atendantaj ilin.

Parizo — ĝi estas Francujo, ĉar kiu el la internacia publiko scias plie pri Francujo ol tio, ke Parizo estas ĝia ĉefurbo?!

Por unuj Parizo estas ejo, kie trovas sin la plej belaj kaj ŝatindaj trezoroj de la arĥitekturo kaj pentrarto.

Do — la grandioza griza katedralo de **Notre-Dame** kun sia plej bela frontono en la mondo, belegaj preĝejoj **Madeleine**; **St.-Chapelledes Invalides** — kun tombejo de granda **Napoleono** — kaj de marŝalo **Foch** — kaj blanka; preskaŭ ĉie videbla, preĝejo **Sacré Coeur de Montmantre** k. t. p. Oni devus ankoraŭ longe enumeri ĉiujn mirindajn vidindaĵojn de Parizo, kiel ekzemple la fame konatan **Muzeon de Louvre**, kie estas kolektitaj la plej belaj pentraĵoj de la mondo kun la die ridetanta **Mona Liza — Gioconda de Lionardo da Vinci**... kaj belaj skulptaĵoj de ĉiuj tempoj kun **„Venus de Milo"** — kaj poste **Muzeo de Luxembourg** en ĉarma parko — **Muzeo de Clugny Panteono**, kie eterne ripozas eminentuloj de Francujo.

Por aliaj Parizo signifas grandajn mondvivplenajn, senzorgajn **bulvardojn** — kun elegantaj kafejoj, teatroj, kinoj, riĉaj magazenoj, vastegajn placojn, kiel **Place de la Concorde**, Pl. de la **Vendome**. **Place de l' Etoile — Les Champs Elysées** kun grandega **L' Arc de l' Etoile** — kie rapidas senĉese seninterrompa nemezurebla ondo de aŭtomobiloj, **L' Avenue de l' Opera** k. t. p.

Oni ne devas ankaŭ forgesi pri tiu plej alta fera turo en Eŭropo turo de Eiffel, kiu eliĝas, fabele en la nokto lumigita, super la Metropolo.

Por aliaj ankoraŭ Parizo estas **Montmartre** kaj **Montparnasse** — malnova kaj romantika — urbparto kun placo kaj strato **Pigalle**, kie regas grandmonda vivo de „feliĉaj posedantoj", de riĉaj eksterlandanoj (étranger), kiuj volas amuzi sin je ĉiu prezo:

Do famaj **„kabaretoj"** kaj **„Music — halls"** kiel **Folie Bergères — Palace** — kun centoj da ĉarmaj kaj... senriproĉe „konstruitaj" kaj plej ofte... tute senvestigitaj belulinoj — girlsoj — poste la fame konata **kabareto de „Nigra kato"** (Chat-Noir) **Cabaret du Neant** (de neekzisteco), kie oni rememorigas gastojn, ke malgraŭ ĉio — la lasta kaj neevitebla celo de la vivo estas.. morto kaj kie oni sidas ĉe la ĉerkoj kaj trinkas... „salivon de ftizulo"... nome... bieron..., poste **kabareto de ĉielo** kaj de l' **inferno... kaj.. kaj. t. s.**

Kiam la nokto alvenas, la strato **de Pigalle**, same kiel aliaj stratoj kaj bulvardoj, dronas en la radianta torento de mil lumaj reklamoj de cent kabaretoj, dancejoj kaj aliaj gajaj ejoj, kie regas senĝene du dioj **Bakĥo** kaj **Venero**.

Ĉie aŭdiĝas la tonoj de ĝazbando, kaj oni vidas dancantajn parojn. Sur la senĉese viglaj stratoj de **Montmartre** promenas aŭ veturas granda aro da elegantaj virinoj, „veraj Parizaninoj", sed ankaŭ diversnaciaj kaj lingvaj belulinoj, — kreolinoj, hispaninoj, negrinoj, anglinoj, fine polinoj, kiuj „pariziĝis" en Parizo tre rapide. Oni ne povas esti longe.. sola en Parizo, nur... duope... ĉar... tiom da „okazoj" estas tie.

Kiam oni promenas tra la parizaj stratoj kaj bulvardoj kaj en **Bois**

de **Boulogne**, fine ĉiuloke oni havas impreson, ke la **ĉefa afero** en Parizo estas.... **Amo kaj Virino.** „L'amour c'est la vie et tout le reste est... rien". (Amo estas vivo kaj la resto estas... nenio).

La bakciloj de l'amo pli ĝuste... de la ĝuo kaj diboĉo flugpendas en pariza aero... oni sentas ilin ĉiuloke kaj se oni ne estas tro maljuna.. esperantisto kaj se oni havas sufiĉe da... mono, oni ne povas rezisti al ilia infekto — tian allogan, sed ofte danĝeran, influon havas la... pariza vivo.

Por neniu cetere — mi kredas — estas jam sekreto, ke Parizo ne estas ia modesta aŭ pia urbo — kontraŭe — ĝi estas vera moderna **Babilono, Sodomo kaj Gomorro,** — vere por fremduloj — kie regas idolana signaldiro de Horacio: „Carpe diem" — ĝuu, aŭ utiligu la tagon — vivon". — Sed tiu „Sodomo" — estas certe danĝera, nur por tiuj, kiuj volas riski danĝeron (risquer le peril) kaj serĉas ĝin...!

Estas ankaŭ alia Parizo, kie oni lernas kaj studas.. **„Quartier latin"** latina urbparto kun multcentjara Universitato **Sorbonne,** kun **strato de lernejoj** (rue des ècoles) kie loĝas diverslingvaj studentoj el la tuta mondo, kiuj tamen ne volas nur „Ĝui la vivon", sed ankaŭ lerni...

Fine oni ne devas forgesi, ke por multaj homoj, speciale por virinoj, Parizo estas egalsenca kun diktatoroj de la virina modo. — Do **Paquin, Worth, Poiret** — (gravaj nomoj). Parizo signifas la lastan modan parfumon, aranean ŝtrumpeton la plej novan ĵurnalon de modo. Kaj frizaĵon...

Neniu estas — granda aŭ malgranda — kiu ne revus pri Parizo, aŭ kiu estinte jam foje en ĝi — ne sopirus post tiu „urbo de la lumo" kaj ne dezirus reveturi tien.

Kaj tio absolute ne estas ia snobismo aŭ poezia hiperbolo, ke Parizo estas la plej bela kaj plej ĉarma urbo de la mondo.

Ofte sufiĉas nur nomi la vorton „Parizo" kaj tuj la vizaĝoj de tiuj, kiuj estis en Parizo, heliĝas kaj zorgplena rido aperas sur la buŝo (kiel ĉe mi).

Tuj revivas rememoroj de la luma urbo, ĝiaj vastaj placoj kaj bulvardoj, vivplenaj bulvardoj kaj parkoj, gajaj ĉiam ridetantaj homoj, beletaj ĉarmaj fraŭlinoj — midinettes!

Neniam oni povas forgesi tiun senzorgan, senĝenan kaj vere ĝojan atmosferon, kiu regas ĉie en Parizo — (tute alie, ol ĉe ni), sur la stratoj kaj en la parkoj, kie oni vidas tre ofte reciproke sin kisantajn parojn kaj en kafejoj, kie rezidas, preskaŭ la tutan tagon, diverslingvaj kaj diversrasaj artistoj, kaj iliaj „modeloj".

Oni tuj vidas, ke Parizanoj volas kaj scias ĝui la vivon kaj ne ĉagreniĝas senĉese, kiel ni, tiel nomataj „Francoj de la Nordo". **Daŭrigota.**

JULJAN EISMOND.

PATRINO.

Bela estas la praarbaro de Polesie dum vintra vespero, kiam la blanka neĝo sur la herbejoj ekfajras per miloblaj koloroj, ekbrilas per lazuro kaj oro, antaŭ ol ĝin ruĝigos la lasta kiso de l' foriranta suno...

Silentas la praarbaro de Polesie, kiel tiuj sanktaj arbaroj, en kiuj oni antaŭ jarcentoj oferdonis al dioj, serioza kaj trankvila, per suproj de piceoj kaj alnoj ŝajne tuŝanta ĉielon, nealirebla kaj mistera. Suprenleviĝas belformaj arbokolonoj, etaĝiĝas surtere tombejoj de falintaj arbaj gigantoj, kovritaj per la blanka kovrilo de l' vintro...

Kaj en la kor' de l' arbarego post la monstraj bariloj de mortintaj trunkoj, malantaŭ la kunpremita arbodensejo, sur insuletoj perdiĝintaj inter la frostiĝintaj marĉoj, estas la reĝolando de l' sovaĝa bestaro. Alko larĝekorna havas tie siajn paŝtejojn, urogalo kanti tie komencas dum aprila mateno kaj vintre sur necerta glacio lupaj aroj aranĝas sangajn ĉasojn kontraŭ kapreolo aŭ vulpo ĝuas birdoĉasadojn...

Tamen reĝo kaj estro de tiuj regionoj estas nek alko milda, nek cervo, kiu venadis iafoje ĉi tien el malproksimaj ĉirkaŭaĵoj serĉante manĝaĵon, nek facilpieda kapro, nek lupo saĝa, nek urogalo kun orverda brusto, sed terur' de l' arbaro — kuraĝa linko, antaŭ kiu tremis ĉio de cervo ĝis arbara muso, de urogalo ĝis birdeto kantanta en la densejo...

Granda estas ĝia reĝolando. Ĝi trakuradis ĝin laŭlonge kaj laŭlarĝe serĉante l' akiraĵon... Mortigadis ĉion renkontatan dumvoje. Konfidis pri sia forto. Ebriigis ĝin la sango. Revis pri ĝi la ĉasistoj — vane. Ĝi havis viglajn okulojn kaj akrajn orelojn. Estis sentima kaj obstina, kaj ili estis nur obstinaj... Vane ili kontraŭ ĝi pelĉasojn aranĝadis kaj kaptilojn starigadis. Ĝi la pelistojn evitis kaj ĉirkaŭiris la retojn.

Ĝis fine, kiam akra vintro premis per malsato la tutan arbaregon, la minaca estro mortis enfalinte ferkaptilon.

Restis post li linkino kaj du idoj. Ili travivis malvarmon kaj malsaton ĉasante dum plenlunaj noktoj je rapidaj kunikloj similaj al neĝospiritoj kaj je vigle flugantaj tetraoj...

Ĝi estis bela ĉasado. L' arbarego ŝajnis esti lando de l' arĝenta fabelo... en malvarma lunbrilo la senmovaj arboj rememorigis blankajn fantomojn...

* * *

Post noktaj ĉasoj la linkoj kaŝis sin en densaĵo meze de l' arbara marĉo... Putrintaj arboj, falintaj kaj englaciiĝintaj, superŝutitaj per neĝo kaj muskokovritaj similas al dormantaj senmove rampaĵoj... Sur unu el ili kuŝas la linkino observante kun maldiligenta plezuro la ludojn de sia idaro... Junaj, sed jam belkreskaj linkoj amuziĝas kiel petolaj katidoj, murmurante kaj ternante. Kondukas heroajn batalojn, simulatan luktadon, kiu instruas lertecon kaj rapidecon de movoj — virtojn tiel necesajn en l' arbarego.

La leviĝanta sun' ekbruligas orajn fajrojn sur la glacio, kolorigas violete la neĝon. Regas stranga kviet' en naturo. La plej eta ventblovo ne konfuzas la blankan silenton de l' arbaro. Iafoje nur ekpepas ie malgranda birdet' en densaĵo kaj subite haltas kvazaŭ hontiĝinte...

La mondo ŝajnas pli juna je miloj da jaroj. Eĉ memoro pri homoj ne rompas la silenton de l' virga arbaro. Nur malproksima knaro de glitveturilo ŝoviĝanta tra l' arbara vojeto rememorigas iafoje pri l' uzurpanta reg' de l' estaĵoj... Tamen la preterveturanta glitilo ne timigas la loĝantojn de l' arbaro.

Jen ankaŭ nun la linkoj aŭdis tre, tre malproksiman knaron de glitveturilo sur l' arbara vojeto... Ili interrompas la ludon, rektigas viglajn orelojn kaj komencas ludi denove... Kaj la leviĝanta suno per siaj unuaj radioj orumas la sovaĝan belecon de tiu sceno.

* * *

Sur l' arbara vojo blindige brilas la fajranta neĝo. La paŝoj de linkoj signiĝas sur ĝi per malhela bluo, kiel ŝnuro de grandaj, lazuraj

perloj. Fluas rapida glitveturilo tra l' vojo, kaj en la glitveturilo sidas l' arbaristoj.

Ili rimarkis la freŝajn postesignojn. Elsaltis el la glitveturilo senlaŭte. Kliniĝis super la tero.

Trafluis la glitveturilo sur la mola neĝo kvazaŭ spirito. Nek ĉeval' ekternis, nek homoj ekparolis eĉ vorton.

Kaj kiam l' arbaristoj ĉirkaŭveturis la regionon kaj ne trovis forirajn postesignojn de l' bestoj, l' espero plenigis ilian koron. Kaj ili revenis al la ĉasistejo por ĉirkaŭi la linkojn en l' arbaro per ŝnuro kun flagetoj...

La suno supreniris dume sur la palebluan ĉielon kaj elbruligis vivajn fajrojn sur la neĝkovritaj arboj...

La linkoj ĉesis ludi. Kuŝiĝis sur la muskokovritaj falintaj arbotrunkoj, dormetis maldiligente, sendanĝere kaj senzorge... Kaj la vintra suno dorlotis iliajn orbrilajn felojn...

* * *

L' arbaristoj baldaŭ revenis. Komencis pendigadi sur malaltaj arbustoj proksime ĉe l' tero lupŝnuron, ornamitan per purpuro de flagetoj, ŝnuron, vekantan timon en la koroj de linkoj, vulpoj kaj lupoj...

Senlaŭte ili paŝis tra l' arbaro ĉirkaŭante la densaĵon per ruĝa rondo de l' morto... Sur la neĝblanko la malgradaj flagetoj ruĝiĝas kvazaŭ sangaj flokoj de iaj strangaj floroj kaj dum la plej facila ekblovo flirtas similaj al rubenaj papilioj, tremas kiel pulsantaj gutoj de viva sango.

Jam estas ĉirkaŭita l' arbaro, jam la besto fermita en la densejo. L' arbaristoj revenis en malproksiman ĉasistejon kaj de tie sendas informojn en la mondon alvokante ĉasistojn el urbo por linkoĉaso en arbar' de Polesie... Kuras ĝoja sciigo kvazaŭ vigla trumpeta resono kaj informas: „Linkoj ĉirkaŭitaj. Venu tuj".

Do oni veturas...

* * *

La luno malalte super l' arbar' ekruliĝis kaj per malvarma brilo luminigis ĝian neĝblankon. Sur la glaciiĝintaj marĉoj ekbruligis orajn vojojn.

Enrigardis en la densejon scivole, salutis ĉiun beston ĉasantan je tiu ĉi horo, ĉirkaŭrigardis ĉiun sangomakulon sur la neĝblanko, ekridetis al la konataj arboj... Sed subite kun mirego rimarkis aĵon neniam en l' arbaro viditan, misteran ruĝan ŝnuron, kurantan sur arbustoj ĉirkaŭ la densejo... Ekmiris, leviĝis pli alte, por pli bone vidi, kaj paliĝis pro teruro...

* * *

Kiam alvenis krepusko, la linkoj dormintaj sub neĝŝarĝitaj branĉoj de piceo, vekiĝis, maldiligente rektiĝis kaj eksentis penetran malsaton, sub kies perforta ordon' ekiris al ĉasoj.

Ili ĉasis ĉiam unuope. Iliaj sovaĝaj ĉasoj plenigis per teruro la tutan arbaregon. Ili ne persekutis la beston lupamaniere, malkaŝe kaj obstine, sed per mallaŭta, kata paŝo trakuradis l' arbaron laŭlonge kaj laŭlarĝe, ŝteliris sensusure sur neĝo, por fali per subita, neesperita salto sur la viktimon, ekmordi ĝin profunde, mortigi...

Ili ne serĉis la postesignojn de besto sur la neĝo: l' okul' kaj l' orelo donadis al ili l' akiraĵon. Kaj se la linko maltrafis en salto kaj besto forkuris netuŝite — neniam ĝi persekutis la maltrafitan akiron, sed rekomencis la sangan ĉasadon...

Linko-patrino rektigis atente l' orelojn — jen mallaŭta, neaŭdebla preskaŭ kuniklo per susuro de l' neĝo signis en l' arbaro la vojon de sia nokta vagado...

Ŝi kaŝiĝis komencis mallaŭte surventre ŝteliri al l' akirajo. Tiel ŝi l' okulojn en ĝin enprofundigis, ke nenion ŝi vidis ĉirkaŭe. Proksimiĝinte jam je l' distanco de kelkaj paŝoj, ŝi kurbiĝis kaj faris potencan salton unu, duan, trian — kaj subite...

La kuniklo pereis kiel spirito kaj la link' en salto falis sur la streĉitan ŝnuron, kiu ekflagris per ruĝo de flagetoj. La besto kunvolviĝis pro teruro, haltigite en duonsalto faris rulajon, poste rapide leviĝis kaj kun timo forkuris en densejon...

Aperajo mistera plenigis ŝin per angoro, la sentima estro de l' arbaro, kiu kuraĝe, cervon atakis, ektimis strangan timigilon. Ŝi forkuris tutforte, kiom eble pli malproksimen, nur malproksimen, nur profunden en l' arbaregon. Mejlojn trakuri tra blankaj arbaroj kaj ne niam reveni malbenitan densejon kun la flirtanta ruĝa embusko!

Tamen sur vojo, kiu kondukis la linkon al malproksimaj kaj sendanĝeraj arbaroj, aperis en la lunbrilo denove la terura fantomo plenigante per angoro la bestan koron. Ree tiu ŝnur' malbenita, simila en senmovo al fadeno de rigidiĝinta sango...

* * *

Teruro kaptis l' arbarajn loĝantojn, fermitajn en la rond' ensorĉita. Nur leporoj, famaj timuloj sentime transsaltadis la ŝnuron.

La linkoj tamen, ĉiuj tri, kuradis angore tien kaj reen kvazaŭ en kaĝo, renkontante ĉie la ruĝan barilon kvazaŭ kradon, kaj fine kuŝiĝis en la koro de ĉiuflanke ĉirkaŭita densejo.

Kiam la tagiĝo rozumis la neĝojn kaj flamigis diamantojn sur l' arbobranĉoj, la linkopatrino, kvazaŭ sub influo de iu pensekbrilo, leviĝis kaj proksimiĝi komencis al la ŝnuroj... La junaj postesekvis ŝin...

La saĝa besto komprenis, ke resti en la terura, ĉirkaŭita densajo — signifas morti. Kaj ĉar ĝi kiel ĉio en l' arbaro, de besto ĝis malgranda floreto, ŝatis la vivon, ĝi decidis tiun morton eviti.

Venkante la mistikan timon, la granda kato kuraĝe saltis al la ŝnuroj, kaj enkure per potenca salto transpaŝis la ruĝan barilon. Estis ree libera en la libera arbaro. Eksentis senliman ĝojon de sovaĝa besto, kiu forkuris el kaĝo. Neniam ankoraŭ l' arbaro ŝajnis al ĝi tiel bela. Nur ne rigardi malantaŭ sin. Nur ne vidi la teruran ruĝon de minacaj flagoj.

Sed subite malantaŭ si la linkin' enkaŭdis suferan, mallaŭtan miaŭadon. Jen la junaj linkoj, timigitaj per la kuraĝo de l' patrino, postulis ŝian helpon...

Ŝi alvokis ilin kiel iam, kiam ili estis malgrandaj kaj senhelpaj. Ekvokis ilin, kiel en tiuj malnovaj tagoj, kiam ĝi ilin kunvokis al freŝa, tremetanta ankoraŭ akiro...

Senefike.

Tiam la plej bona el la patrinoj ekkuraĝis heroajon. Sen hezito ŝi revenis en la malbenitan ĉirkaŭajon por elkonduki siajn idojn en liberon...

Kaj komenciĝis laciga, pacienca, obstina proksimiĝado de junaj linkoj al la ŝnuroj. Komence ili iris kuraĝe. Tamen ju pli proksime al la timigilo, des pli forlasadis ilin la kuraĝo. Ili rampis surventre tra l' neĝo. Haltkuŝiĝis tremetante pro l' angoro. Kaj timeme kvazaŭ batitaj hundoj ili forkuradis en l' arbustojn. . . .

Tri fojojn la linkin' alkondukis ilin ĝis la ŝnuro, trankviligis, frotkaresis ilin ame, murmuris senteme, trenis minace, fine per kuraĝa salto transiradis la barilon minacan kaj vekantan en ŝi timon. Kaj tiam la junaj rampis sur la neĝo en l' arbaron — returnen...

Ĉiam pli granda malkvieto plenigis la koron de l' patriono. Ŝi komprenis la dolorigan veron, ke la junaj linkoj ne lasos sin elkonduki el la embusko. La malkvieto kreskis en ŝi ĉiumomente. En l' okuloj ekflagris verdaj flamoj. Streĉita vosto montris la plej altan nervekscitón...

Alkondukinte la junajn linkojn al la timigilo, ŝi komencis malrapide puŝi ilin al la ŝnuroj. Per rigardo plena je malespero ŝi penis altiri l' infanojn al si. Vane.

Ili turnis je ŝi nenian atenton, ensorĉitaj per la sangaj ĉifonoj.

Ŝi saltis fine. Dum tio ŝi tuŝis la ŝnuron, kiu ekbalanciĝis kaj ekflirtis. Tiam la junaj linkoj forkuris kvazaŭ brogitaj kaj malaperis en la blanka densaĵo.

Ŝi atendis. Ekvokis kaj atendis denove. Esperis ankoraŭ, ke ili revenos...

Kaj kiam ili ne revenis, ŝi malrapide, haltante kaj ĉirkaŭrigardante kun malespero, komencis iri en l' arbaron. Silent' interrompata per nenio regis en la blanka per sun' lumigita arbarego. Nek pego bekfrapis, nek akcipitro ekpepis en lazuroj. L. arbaro neniam brilis per tiel sovaĝa beleco.

La linkino fugis en la blankan arbaron ĉiam pli rapide — kaj ĝuis ĉiam pli grandan plezuron pro reakirita libereco...

Subite... en la kvieta arbar' aŭdiĝis sono de ĉasista trumpeto. Ĝi ŝiris la sanktan silenton de l' vintra arbaro, plenigis mutiĝintajn pro timo densaĵojn, frapis la ĉielon proklamante ĝojon de ĉasistoj kaj morton de bestoj...

La linko forkuranta el l' arbaro haltis. Ĝi komprenis, ke proksimiĝis moment' de l' elekto inter la idoj kaj la libero. Ĝi amis ilin per amo praa kaj amis la sovaĝan liberon en l' arbaro. Rigardon plenan je sufero ĝi turnis malantaŭ sin, kie ĝi forlasis la junajn linkidojn en la ĉirkaŭita per flagetoj densaĵo, kaj ree kun doloro rigardis antaŭ sin sur l' amatan arbaron. Unu el ambaŭ ĝi devis adiaŭi por ĉiam.

Kaj tiam la trumpeto la duan fojon aŭdiĝis pli laŭte kaj forte. Ekkriis la pelistoj. Komenciĝis ĉasado.

La linkino ĉesis heziti. En ŝiaj movoj nun estis videbla nerevokebla decido. Ŝi elektis sian pli grandan amaĵon. Revenis al la danĝera densejo, kie ŝin atendis la idoj — kaj la mort'.

Ŝia kuro fariĝis ĉiam pli rapida. Per grandaj saltoj ŝi kuris rekte al l' arbustoj, sur kiuj pendis la ŝnuro. Transsaltis la timigilon kaj malaperis en la minaca densejo. El la pola lingvo tradukis **Baroko.**

R. MARKIEWICZ.

MI KISAS MANON VIAN, SINJORINO...

(filosofi-paŭka diskuteto)

.....kaj mi pensas, ke ĝi estas la buŝo via. Se oni kisas la manon, oni povas imagi, ke oni kisas la buŝon. Ĉar tio koncernas precipe la sinjorojn, mi devas supozi, ke ĉiu sinjoro havas tian kapablon de la fantazio kaj facile li povas tion imagi.

Do tio, ke ĉiu sinjoro havas tiom da fantazio kaj logiko, sufiĉas, ke li siaparte ne altuŝu per la buŝo la kremojn de la plej diferencaj fabrikadmanieroj kaj

la gantojn diferencajn sur la manetoj de la sinjorinoj. Se oni memorigos al ili, ke ne estas esceptite, ke iu antaŭ li prisputis la maneton de la sinjorino, diablo scias, per kia eligaĵo, mi estas certa, ke li por la propra profito ĉesos kisi tiujn kalodermojn, glicerinojn k. t. p., kaj se al iu mankas la kuraĝo, enskribiĝu kiel la membro de SANLIGO kaj li enmetu en la butontruon la signon, kiu senkulpigos lin kaj liberigos de la „krimo", estigata per la ĉeso kisadi la manojn kaj gantojn.

Sed tio ne sufiĉas. Oni devas memorigi al la sinjorinoj, ke ne ĉiuj buŝoj de la sinjoroj almetitaj al la mano de la sinjorino esprimas la estimon, ke ofte enestas en tio malbeno kaj abomeno kaj la sinjorinoj ne devas vidi en ĝi sole la pruvon de la ĝentileco. Ili devas sciiĝi, ke la sinjoroj uzas ofte la kison sur la mano kiel la rimedon por alproksimiĝi al ŝiaj buŝoj senĝene. Ĉu ĉiuj sinjorinoj volas de ĉiuj tiamaniere esti kisataj?

Ĉu tio ne ofendas la sinjorinojn, ke ĉia sinjoro — kvankam tute ne konata ĵus prezentita, sen la demando pri ŝia permeso, kraĉas ŝian manon?

Konsideru iomete kaj faru eksperimenton: ne permesu, sinjorinoj, al iu ajn kisi viajn manojn, kaj vi konvinkiĝos, ke vi havos la veran plezuron kaj kontentecon, se iu afabla kaj al vi agrabla sinjoro kun via permeso ekkisos viajn manojn, sed ne nur tial, ĉar li volas tion ĉi. Tia kisado estos eble ne tiel ofta, tamen pli ĉarma kaj rava, kaj krome ĝi signifos iometon.

Obeu min, sinjorinoj! defendu vin kontraŭ la mankisado kaj baldaŭ vi konvinkiĝos, ke kisos nur tiu, al kiu vi permesos ekpensi, ke li kisas vian buŝon. Kaj tiam estos la kisado pli granda sopirita valoro de la vera sentado.

Vi, sinjorinoj, helpu al la Sanligo, helpu al la sinjoroj forjeti la malbelan kutimon, kiu en multaj landoj tute ne ekzistas.

Se depost tiu momento iu sinjoro kliniĝos al via maneto, vi diru al li: enskribiĝu kiel memoro de la Sanligo! Presita en „Liga Zdrowia".

RECENZOJ.

ERICA MAXWELL: „**Anstataŭa Edzino**". El la angla tradukis M. Sampson 212 paĝ. Eldonejo „Heroldo de Esperanto" 1930.

Malofte oni renkontas, ke la libroj en Esperanton tradukitaj, (ne originalaj) havas ankaŭ esperantajn heroojn.

Kun tiom pli granda plezuro oni legas la romanon „Anstataŭa edzino" kies verkistino estis fervora amikino de nia lingvo kaj ofte uzadis sian talenton por disvastigi la lingvon kaj ĝiajn ideojn.

La libro estas moderna, tre interesa romano, la atento de la leganto estas streĉita de komenco ĝis fino. Oni vere ekscitiĝas, legante pri strangaj okazaĵoj de l' anstataŭa edzino de la simpatia esperantisto Julian Firth kaj oni ĝojas kun ili pro la bona fino. Krom la enhavo, la bonaj traduko kaj lingvo faras la libron tre rekomendinda. **H. Kantorowicz.**

KENELM ROBINSON: „**Se Grenereto**"... Londono 1930. Propra eldonejo de aŭtoro. Ĉefdeponejo: Heroldo de Esperanto. Köln, Germanujo. Originale verkita.

Legante tiun libron oni vidas, ke skribis ĝin homo bone konanta la vivon, homo vidanta ĉiujn ĝiajn malvirtojn kaj havanta la kuraĝon ilin malkaŝi. Robinson sentas iun mankon en ĉio, mankon de grenereto — grenereto da kompreno, da konfido k. t. p. Li vidas, kiel la homoj juĝas anstataŭ kompreni, kiel la instruistoj vergas senkompate, ne scivolante eĉ la kaŭzon de la „peko".

Li vidas, ke sukceso de aŭtoro dependas plej grandparte de subteno de iu eminentulo, ke la sukceso kaj famo de iu verko aŭ novelo dependas de subskribo de iu fama persono, ke duono de romanoj estus juste rifuzita, se la aŭtoroj estus nekonatuloj. Li tuŝas ankoraŭ multajn temojn lasinte la solvon al la leganto. Unuvorte: la libro donas al ni bonan pensmaterialon kaj stimulas nin iom enpensiĝi kaj haltiĝi ĉe aferoj, kiujn ni pasigas indiferente. „Se Grenereto"... estas diverse skribita, ĝi enhavas kritikojn, diskutojn, novelojn el kiuj la plej bela kaj interesa estas „La fremda knabo". Ni havas ĉi tie belan skizon en lingvo Esperanto de knaba lingvaĵo de ordinaraj knabaj esprimoj el la ĉiutaga vivo — kion la aŭtoro revas vidi efektiviĝonta.

Domaĝe nur, ke li lokis la esperantajn estontajn knabojn en la malmodernan, malnovan, vergeman lernejon, anstataŭ en la kreantan, novan, gajan.

La libro konigas nin ankaŭ pri anglaj moroj, kutimoj kaj pensmaniero.

Mondlingvo-Eldonejo en Katowice (Plebiscytowa 25) aperigis du libretojn. Unuakta teatraĵo „**La senvola svatanto**" kaj „**Marionetaj ludoj**" prezentas bonan

materialon perfektigan por la komencantoj, tiom pli allogan, ĉar facil-stile, klare kaj gaje skribitan. Ilia aŭtoro — Krysta Ludwik.

JOHN MERCHANT: **Kompatinda Klem** — eldonita de the Esperanto Publishing Company Ltd., London, Havebla ĉe Brita Esperantista Asocio, 142, High Holborn, London, W. C. 1. Prezoj: broŝ. 1 ŝ. 6 p. bind. 2 ŝ. 6 p. plus afranko.

Ĝia enhavo rememorigas al leganto travivaĵojn dum la esperantaj kongresoj. Per la personoj de tiu ĉi verko la aŭtoro pritraktas kaj prezentas al ni la hodiaŭajn homojn kun iliaj aspiroj kaj problemoj. La aŭtoro ne forgesis priskribi la morojn de diversaj nacioj, pri kiuj ni legas en ĉi tiu libro.

La verkisto gajigas nin per kelkaj malgrandaj, tamen bonegaj humoraj epizodoj. Sinceran laŭdon meritas lia stilo kaj pureco de la lingvo, kaj pro tio la libro taŭgas eĉ por komencantoj. La libro povas servi kiel ekzemplo de bona stilo kaj kiel propaganda libro por Esperanto. **Samuel Rubinstein.**

TEODOR STORM: **Du Majstro-Noveloj.** Tradukis el la germana lingvo Heino, Heitmüller. Eldonis: Heroldo de Esperanto Köln, Brüsseler Str. 94 (Germanujo) 1929.

La libro konsistas el du noveloj. En la unua sub la titolo „La Blankĉevala Rajdanto" la autoro tre interese priskribas la malfacilan vivon de frizoj, loĝantaj ĉe la Norda Maro, kiuj konstante devas kontraŭbatali la minacantan al ili superakvegon. — Kun kreskanta scivolo ni legas la libron, kaj speciale interesas nin la sorto de ĝia heroo, kiu pro sia nobla karaktero kaj kuraĝo akiras nian simpation. — Lin ĝuste la popolo nomis la „Blankĉevala Rajdanto" pro la preferata de li stranga blanka ĉevalo. — Kun streĉita atento ni akompanas lin (spirite) dum la danĝera nokto al la furiozanta maro, kien ankaŭ lia fidela, amata edzino kun la infano lin sekvas, kaj la senkompataj ondoj ĉiujn englutas. — Laŭ onidiroj inter la friza popolo „La Blanĉevala Rajdanto" de tempo al tempo reaperas en Frizlando kiel fantomo. — Tute alispeca estas la dua novelo, tamen ankaŭ tre interesa. Kun vera kortuŝo ni legas ĝin. — Tre subtile kaj plenkomprene la aŭtoro priskribas lo homajn sentojn. — Ni vidas, ke la amo estas pli forta ol la morto, kiu ĝin ne povas estingi, tamen poste... la tempo kaj la vivo faras la siajn. — Ankaŭ la tradukinto meritas nian laŭdon pro la klara kaj bonstila traduko kaj pro la bona elekto de libro, ĉar ni esperantigu nur interesajn kaj valorajn librojn! **Ewa Buchsbaum.**

GIOVANNI PAPINI: **Historio de Kristo.** Eldonejo A. Paolet. Tagliamento Ital.. Paĝoj: XXX plus 574.

La historio de Kristo estas tre alloga por verkistoj. Jam multaj priskribis ĝin laŭ diversaj vidpunktoj rigardante. Do ekzistas libroj pri tiu temo, kiuj estas malpermesitaj por kristanoj. Sed tio ne estas en tiu ĉi kazo, ĉar la aŭtoro sin bazis sur la Nova Testamento kaj la Evangelioj, disvolvante temon per sia riĉa fantazio, per varmeco de sia kredo, per ĉarmo de pura poezio.

Estas bone rememori la helegan, plenan de boneco kaj sindono vivon de Kristo en nia epoko, kiu vivas tiom malproksime de Liaj instruoj. La legado de tiu bela libro efikas kiel pura bano post la malbeleco, aĉa egoisteco de l' nuntempa vivo.

„Vivo de Kristo" ne estas enuiga religia libro; ĝi estas verkita de moderna homo, konanta la arton krei vivajn, interesajn bildojn, do li povas kapti atenton eĉ de homoj indiferentaj por kristana kredo.

Li faras ĉarman rakonton pri l' dia idilio, kiu finiĝis per kruela tragedio. Sen tiu ĉi ne ekzistus la religio de l' pardono kaj kompato, akceptita de milionoj da homoj.

La aŭtoro ne pritraktas teologiajn misterojn, ne enuigas per la disertacioj, li volas simple rememorigi al la homaro la belegajn vortojn, agadojn, miraklojn de Kristo, tiom-foje forgesitajn.

Eble li celas plibonigi la legantojn, sugesti al ili la penson: vivu kiel Li vivis, memoru ke „ne nur per sola pano vivas la homo sed per ĉiu vorto de Dio".

La esperanta traduko perfekta klara, plena de belaj, bontrovitaj esprimoj invitas al la legado. **M. S.**

POLLANDA KRONIKO.

DĄBROWA GÓRNICZA. La 10-an de junuaro k. j. je la 18-a horo en Asociejo okazis jarkunvena novelekto de la estraro: J. Durnas prezid., B. Klechniewska vicprezidantino, J. Smalec sekretario, J. Zbroszczyk kasisto, J. Stanek anstataŭanto, M. Grzanka bibliotekisto, J. Skibówna, A. Kwiecień kaj J. Górecki

kiel revizkomisiono. La 23-an de januaro k. j. okazis dua dum ĉi-vintro dancamuzo aranĝita de la Asocio. De 1-a II. k. j. estas gvidata nova kurso por komencantoj, gvidata de s-no J. Durnaś.

LUBLIN. — Okaze de 13-a jardatreveno de Pola sendependeco la 11. XI. k. j. okazis en Popollernejo je nomo de St. Batory solena esperantista Akademio. Riĉan polan kaj esperantlingvan programon, konsistantan en du paroladoj, deklamado, kvartetludo kaj ĥorkanto dece plenumis: S-ro L. Leszczyński, S-ro Miklaszewski, S-ino I. Pruska, S-ro D-ro J. Mędrkiewicz, S-ro Jurczuk, S-ro Cimek, S-ro Cz. Pruski kaj 8-jara F-ino Jadzia Pruska. La akademion partoprenis ĉiuj lublinaj geesperantistoj. — La 29. XI. k. j. Estraro de P. E. A. decidis kaj forsendis senpere al Senatano Borah en Vaŝingtono (U. S. A.) esperantlingvan proteston kontraŭ lia parolado, rilatanta t. n. „polan koridoron". — Kopio de la protesto estas forsendita al Ministerio de Eksterlandaj Aferoj kaj al Pollanda Esperanto-Delegitaro en Kraków. — La 9. XII. oni decidis inviti la plej proksiman Konferencon de P. E. D. al Lublin, kiu dank' al sia centra situo estas tre taŭga urbo por tiu celo. — „Ligo de Esperanto-Amikoj" ĉe P. E. A., gvidata de S-ro Zygmunt Feld kaj „Junulara Rondo" — gvidata de S-roj Klimowicz kaj Janicki bone prosperas. Membroj de la Ligo kunvenas ĉiumarde, membroj de la J. R. — vendrede. — Tagjurnalo „Ziemia Lubelska" enhavas konstantan Esperanto-Angulon. — Kelkaj judaj esperantistoj intencas fondi Judan Esp. Societon. Ili jam havis organizan kunvenon.

LWÓW. La okazinta Jubilea Festvespero okaze de la 25-jaro ekzistado de Esperanto-Societo kune kun la soleno de la datreveno de naskiĝtago de nia Majstro estis tre impona kaj tre sukcesa. La programo estis riĉa kaj elvokis admiron kaj entuziazmon ĉe la aŭskultantaro. La ĉambrego de la Teĥnologia Instituto bele ornamita en esperanta stilo kun granda pentrita bildo de nia Majstro kaj esperantaj kaj polaj kaj internaciaj flagoj en mezo estis plenplena. Ĉeestis multaj invititaj gastoj, inter ili reprezentantoj de la Registaro, de la Militistaro, de la Urbo kaj la Kuratoro.

De ĉiuj membroj de la Honora Internacia Komitato venis telegramoj aŭ leteroj. Tre kortuŝa estis la letero de Lia Moŝto Ĉefepiskopo de Kalocsa, Dro Julio gr. Zichy.

Multaj aplaŭdoj aŭdiĝis, kiam oni menciis la est. nomon de la bedaŭrinde ne ĉeestanta Prezidanto de Pollanda Esperanto Delegitaro.

SOSNOWIEC. La laboro de Esperanta Delegitaro de Zagłębie dum 1931. Prezidanto s-ro d-ro A. Ingster, Gvidanto s-ro J. Goldfarb, Ĉe-metoda instruisto.

La 17-an de Januaro k. j. okazis en Sosnowiec delegitarkunsido kiun partoprenis la delegitoj el Sosnowiec, Będzin kaj Dąbrowa Górnicza. El la jarfina raporto ni ekscias la sekvontan:

Enspezoj:		Elspezoj:	
Kursoj	1.811.00 zł.	Instruado	1.047.61 zł.
Aranĝaĵoj	561.20 „	Kurspreparo	320.15 „
Aliaj ensp.	109.48 „	oficista honorario	195.00 „
Saldo de 1930	124.99 „	aranĝaĵoj	683.96 „
	2.606.67 zł.	administrado	85.42 „
		gazetanoncoj	65.60 „
		flugfolioj kaj afiŝoj	184.50 „
deficito	93.57 „	Aliaj elspezoj	118.00 „
	2.700.24 zł.		2.700.24 zł.

El la agada raporto ni ekscias, ke estas eldonitaj 19.000 flugfolioj, kaj 1.100 afiŝoj. Poŝte senditaj estas 806 cirkuleroj. Okazis 5 ekskursoj kun 325 partoprenintoj, 2 provlecionoj kun 450 p. 4 kursoj por komencantoj kun 139 p. 1 kurso por progresantoj kun 18 p. 2 Sinha prelegoj kun 245 p. 1. Zamenhofvespero ligita kun balo 145 p.

Fonditaj grupoj: „Esperantista Klubo Sosnowiec" 70 anoj
„Esperantista Klubo Zawiercie" 30 anoj.

Krom tio: 2 kursoj por komencantoj kun 74 p. Kaj 1 kurso por progresantoj kun 13 p. en Esp. Klubo Sosnowiec.

Ĉiujn ok kursojn gvidis s-ro J. Goldfarb laŭ Ĉe-metodo.

Dum la kursoj estas venditaj esperantaĵoj kontraŭ 508.90 zł.

La Zamenhofvespero enhavis 3-horan literaturan programon, dum kiu f-inoj

Kornfeld, Fiszer, Kozak, Prawer, Belek, Cimerman kaj aliaj, preskaŭ ĉiuj partoprenintoj de ĉi-jaraj kursoj, majstre elmontris la akiritan lingvoscion. Aparte menciinda estas F-ino Fiszer, kiu majstre deklamis, kaj f-ino Prawer, kiu kortuŝe deklamis „En horo de malespero" kaj rolis en „Infanoj en la Parko", ambaŭ de Julio Baghy.

Dank' al tiu ĉi konstanta praktika laboro okazis jam post kelkaj semajnoj la unuaj porinfanaj kursoj en ŝtata popollernejo kaj en knabina gimnazio, la unua sub protekto de ĉi tiea lernej-inspektoro.

La Esperanta Delegitaro de Zagłębie alvokas ĉiujn gesamideanojn, sendi por ekspozicio taŭgan materialon kiel: Afiŝoj, flugfolioj, fotografaĵoj, titolpaĝoj de libroj, prospektoj de komercaj kaj turismaj entreprenoj, ilustritaj poŝtkartoj kun p. m. sur bildflanko k. t. p.

Sendkostoj repagotaj, materialo laŭ deziro resendota aŭ rekompencota. Ĉio sendenda al: **Jozefo Goldfarb**, Cseh-Metoda-Instruisto, SOSNOWIEC-POLLANDO, Str. Wiejska 2.

WILNO. La 23-an de januaro 1932 s-ro S. Szyk, membroabonanto de UEA. kaj kursgvidanto havis paroladon en Vilna Juda Landkonema Societo, pri la fondo, historio, signifo, celo, organizo, membro kaj servado de Univ. Esp. Asoc. Post la parolado li disdonis al la aŭskultantaro diversajn propagandajn materialojn pri U. E. A.

VOĈOJ EL EKSTERLANDO.

DANZIG. Juda Akademia Rondo (Jüd. Akad. Verein.) de la teknika altlernejo organizis esperantan kurson. Partoprenas ĉirkaŭ 20 studentoj. La metodo de pastro Ĉe, laŭ kiu estas gvidata la kurso, ravis ĉiujn, kiujn ĝin ne konis.

KARVINA. Laŭ la decido de la ĝenerala kunveno de la „Mem-eduka rondeto" (Kółko Samokształcenia) de la „Macierz Szkolna" (pola lerneja societo) oni komencis la 4-an de januaro trimonatan kurson de esperanto por komencantoj. Parto-prenas pli ol 50 personoj, plejparte junularo. La kurson gvidas s-o R. Z. Kobiela, konsuleja oficisto el Mor. Ostrava.

PUBLIKA DISKUTO PRI LINGVO INTERNACIA

Je la iniciato de la „Mem-eduka rondeto" ĉe la pola lerneja societo okazos la 21. de februaro je la 14 1/2 posttagmeze en la laborista domo, Karvina-Hahenegger publika diskutado pri lingvo internacia. Ĉar la ĉi-tiea publiko multe interesiĝas pri tiu-ĉi problemo, estas dezirinde, ke la proksimaj esperanto-societoj (polaj, bohemaj kaj germanaj), delegu lertajn propagandistojn, por ke esperanto venku en la diskutado. Esperantistoj, aperu multnombre en Karvina la 21 de februaro!

PROPRA INTERNACIA HEJMO ESPERANTISTA EN ASPREMONT (ALPES MARIT.) FRANCUJO.

La Direktoro de la I. C. K. en Ĝenevo sciigas al ni la jenon: „Post kiam la formalaj detaloj kun la aŭtoritatoj ktp. estas ordigitaj, ni povas sciigi oficiale, ke la movado nun posedas nian unuan internacian hejmon esperantistan en Aspremont (Alpes Maritimes) en Sudfrancujo, 15 km. de Nico. Ĝi konsistas el domo kun 9 ĉambroj instalitaj (kun simpla komforto) kaj tereno da 30.569 kv. metroj. Ĝia celo estas, ebligi al ripozemaj samideanoj kaj turistoj esperantistaj libertempan restadon dum kiu ajn sezono de l' jaro je moderaj kostoj. Ĉar la loko estas limigita, estas necese anonci sin sufiĉe frue. Detaloj estas sciigataj per anoncoj kaj informoj en la Esperanto-gazetaro. Gvidantoj de la Hejmo estas Gesinjoroj E. E. Yelland el Londono.

Detalajn informojn pri la restado oni ricevas kontraŭ 1 respondkupono de **„Internacia Hejmo Esperantista (Nia Civito), Aspremont (Alpes Marit.) Francujo.**

La entrepreno, kiu estas proprajo de la movado, estas ekspluatata sub la aŭspicioj de la I. C. K.".

DE LA REDAKCIO.

Ni sciigas ĉiujn, ke „Pomocniczy Język Światowy" en tiu ĉi jaro ankoraŭ ne aperis pro nesufiĉa nombro da abonantoj. Ni insiste petas per tuja reabono ebligi la baldaŭan eldonon de la gazeto.

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

Drukarnia L. Gronusia i S-ki w Krakowie, ul. Stolarska 6.

ĈIU ESPERANTISTO DEVAS POSEDI:

„Pri la prononcado de esperanto" .. Zł. —.90 gr.
„La senvola svatanto" gaja unuaktaĵo kun polmelodia kanto „ —.90 „
„Marionetaj ludoj", esp. teatra tre gaja unikaĵo „ —.85 „
Prezoj kun afranko.

Aĉeteblaj ĉe „Pola Esperantisto" Kraków, Lubicz 34. Konto PKO 406.660; aŭ ĉe la aŭtoro Lud. Krysta en Cieszyn, Szeroka 3 (Transport Silezia).

E S P E R A N T Y Ś C I!

Nabywajcie niezbędny materjał propagandowy w języku polskim!

Czubryński — Esperanto i Esperantyzm; Wyd. I. 1.25
„ — Esperantyzm; Wyd. II. 3.00
Drojecki — Esp-o i jego zastosowanie w praktyce 0.30
Greffkowicz — Niemi przemówią 1.50
„ — Spóźnione hasła, ze słown. esp.-pol. 0.50
Gryff — W sprawie nauki języków obcych 0.50
Kartki pocztowe (motto Żeromskiego) 10 szt. 0.50
„ — grób Zamenhofa 0.25
„ — pomnik Zamenhofa 0.30
Kronenberg — Dwa artykuły w sprawie Esperanta 0.30
Nalepki propag., pakiet 0.40
Serja widoków Krakowa (z tekstem esper.) 0.80
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego 0.15

pozatem obfitą literaturę naukową, beletrystyczną wysyła za uprzednią wpłatą gotówkową na konto P. K. O. 406.660 z dodatkiem 15% na koszta przesyłki, najmniej 10 gr. (przesyłka polecona 65 gr. więcej).

Administracja „Polskiego Esperantysty" Kraków, ul. Lubicz 34.

Katalog na żądanie bezpłatnie.

Ni ripetas, ke ĉiujn gravajn informojn koncerne la Kongreson en Parizo ni konatigados pere de P. E. Individuajn respondojn pri la afero donas s-o Ludwik Kutscher, Redakcio de Pola Esperantisto, Kraków, Lubicz 34. Ne forgesu alsendi poŝtmarkon por respondo!

ESPERANTO - ENCIKLOPEDIO.

En la lastaj jaroj aperis kelkaj tre gravaj verkoj en Esperanto. Bibliografio de P. Stojan, la Plena Vortaro de Esperanto, la Originala Verkaro de Zamenhof, la verkoj de Remarque kaj aliaj imponaj eldonaĵoj estas dokumentoj pri tio, ke Esperanto jam atingis tiun maturecon, kiam diversaj eldonejoj ne timas aperigi verkojn indajn eĉ al la plej grandaj naciaj literaturoj.

En tiu vico nun la eldonejo **Literatura Mondo** decidis eldoni Esperanto-Enciklopedion, multe bezonatan verkon por Esperantistoj, kiu enhavos ĉion gravan pri la movado, historio, literaturo, propagando, partoprenantaj gvidantoj ktp. de Esperanto. La verkego, kies bazo estas la valora manuskripto de s-ano I. Ŝirjaev, Ruslando kaj kiun redaktas s-roj V. Bleier, K. Kalocsay kaj L. Kökény, deziras estis modelo por kolektiva kreado per la samideanoj el la tuta mondo. Pro tio la redaktoroj alvokas ĉiujn esperantistojn, interesiĝantajn pri tiu ĉi serioza laboro, prezenti siajn opinion, ideon, eĉ artikolojn al la redakcio. Ĉies opinio kaj ideo estas bone esplorata kaj observata por la intereso de la verko. La redakcio respondas al ĉiu en aparta fako de Literatura Mondo ekde la numero januaro 1932. Tial individuan respondon neniu atendu: Ĉiujn korespondaĵojn sendu al:

Literatura Mondo, Budapest IX. Mester-u, 53. V. 7. por Enciklopedio.

ŜANĜO DE LA ADRESO:
„Akademia Esperantista Rondo“ — „Akademickie Koło Esperantystów“
Warszawa ul. Leszno 8/37.

Polskie Akademickie T-wo Esperantystów — Warszawa
prowadzi
Kurs korespondencyjny języka Esperanto.

Kurs polega na tym, że uczestnik jego otrzymuje podręcznik języka Esperanto, podzielony na 12 lekcji, przerabia co tydzień jedną lekcję, tłómaczy ćwiczenia z Esperanta na polski i odwrotnie, poczem przesyła je do poprawienia.

Aby zostać uczestnikiem kursu, należy wpłacić zł. 15.— Opłata ta obejmuje całość kursu wraz z samouczkiem, poprawą przerobionych ćwiczeń i przesyłkami pocztowemi.

Opłatę oraz ćwiczenia (przysyłane w zeszycie) należy kierować pod adres:

Polskie Akademickie T-wo Esperantystów, Warszawa,
Leszno 99. m. 5.

OBWIESZCZENIE.

Do Rejestru Spółdzielni R. S. XII. 1574. Sądu Okręgowego w Warszawie, dnia 29 grudnia 1931 roku wciągnięto: „Esperancka Spółdzielnia Wydawnicza z odpowiedzialnością udziałami w Warszawie“, po esperanoku: „Esperanta Eldon - Kooperativo - Kun kotiza respondeco, en Varsovio“. Siedziba Spółdzielni w Warszawie, Marszałkowska 113 m. 6. Członkowie odpowiadają za zobowiązania Spółdzielni zadeklarowanemi udziałami. Przedmiot przedsiębiorstwa stanowi: podejmowanie wszelkiego rodzaju wydawnictw w języku esperanto, a w innych językach wydawnictw mających na celu propagandę języka i literatury esperanckiej, oraz zakładanie księgarń, bibljotek, czytelni i wypożyczalni książek. Wysokość udziału 10 złotych, płatnych w ratach miesiecznych po 2 złote. Pierwszą ratę winien członek wpłacić przy przystąpieniu. Do Zarządu wybrani zostali: Dr. Antoni Czubryński z Garwolina, Feliks Falkowski, Tarczyńska 20, i Jan Zawada, Zaciszna 2, dwaj ostatni z Warszawy. b). Pismo przeznaczone do ogłoszeń: „Esperantysta Polski“ i „Społem“. d). Zarząd składa się z 3 członków. Weksle, pełnomocnictwa, umowy, akty kupna i inne dokumenty podpisują dwaj członkowie Zarządu. Korespondencje, asygnaty, oraz pokwitowania z odbioru wszelkich przesyłek pocztowych (zwykłych, poleconych i pieniężnych) podpisuje jeden z członków Zarządu. Podpisy winny być kładzione pod stemplem firmy. e). Oznaczenia sumy najwyższego zadłużenia Spółdzielni należy do kompetencji Walnego Zgromadzenia. Warszawa, dnia 29 grudnia 1931 roku. Sąd Okręgowy. Wydział IV-y.

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1932!
Pagu la abonon je nia konto PKO. 406.660.
Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

Redaktor odpowiedzialny: Juljusz Kriss.

Drukarnia Ludwika Grossusia i Ski w Krakowie, Stolarska 6.